

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2022. №2



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2022. №2 (312)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2022

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 33 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2022, №2 (312).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 30 июня 2022 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Dankon pro la subteno!	5
Eventoj	6
Ulrich Brandenburg. "Daŭripovo" – temo de la 99a Germana Kongreso	7
José Antonio del Barrio. La Hispana Kongreso okazis denove ĉeeste	9
Ann-Louise Åkerlund. La Tria Skandinava Kongreso	11
Ronald Schindler. Denove internacia Ponta Festo ĉe Odro	12
Liba Gabalda. VERDEN kaj AMO-seminario en Greziljono	13
Irina Gonĉarova. Volgia Esperanto-renkontiĝo en Dimitrovgrad	14
Povilas Jegorovas. 241 aliĝintoj al BET-56 en Klajpedo	16
La "steloj" de BET	16
Xing Qishuang. Taiyuan: Kurso de Esperanto por infanoj	17
Esperantisto Brandsma kanonizita	18
Adis García Pérez. Nova estraro de Kuba Esperanto-Asocio	18
Kroata Esperanto-Ligo havas novan estraron	18
Julius Viktorsson. Kalle Kniivilä premiita	19
La muzikalo <i>June kaj Kune</i> prezentota en IJK	20
Raporto de la elekta Komisiono de UEA por la mandato 2022-2025	21
AKSO eniras betatestadon	22
Aleksander Korĵenkov. UK-107 en Montrealo: nur 610 aliĝintoj	23
89a Itala Kongreso de Esperanto	23
Tendumado: La ĉefa evento de la Verdaj Skoltoj	24
Pacevento kaj Beneluksa Kongreso en la pacurbo leper	25
Bert Ŝuman. Esperanto-kastelo atendas vian viziton	26
Aleksander Korĵenkov. Stabile malalta membrostadistiko de UEA	27
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas	29
Tribuno	30
Carlo Minnaja. Celebradoj de vojaĝoj	31
Halina Gorecka. La Kurŝa Terlango	35
Lu Wunsch-Rolshoven. La konferenco de EU apenaŭ rimarkis Esperanton	41
Renato Corsetti. Monda koalicio por lingvaj rajtoj	43
La Estraro de REU respondas al UEA	44
Pacon al Ukrainio, pacon al la mondo!	45
TAP: Sezono por plantado kaj donacalvoko	47
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Familioj	48
Mesaĝo de UEA al UN kaj civila socio okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj ..	49

Arkivo	50
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en julio 2022.	51
Laimundas Abromas. La ora jubileo de "Horizonto"	53
Kulturo	55
Aleksander Korĵenkov. Aleksandr Kuprin	56
Aleksandr Kuprin. Siringo. Viando. Helenjo. Nokta violo (Tradukis Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov, Ludmila Novikova)	57
Ewa Grochowska. La vojaĝoj de Telma	88
Paulo Sérgio Viana. La venĝo	92
Centoj da numeroj de <i>Kontakto</i> kaj <i>TEJO Tutmonde</i> alireblaj libere	93
Miguel Fernández. Novaj poemoj.	94
Wolfgang Kirschstein. La plej bonaj filmoj de la jaro	99
Stanislav Belov. Daniel Stein: Historio pri identeco kaj (mal)kompreno (Recenzo: Ludmila Ulickaja. <i>Daniel Stein, interpretanto</i>)	104
Paŭlo Moĵajevo. Negranda, sed atentinda metalroka albumo (Recenzo: <i>Barok-Projekto. Kvin Jarcentoj</i>)	107
Glebo Malcev. Kontraŭ la verda monstro (Recenzo: <i>Esperanto Subgrunde 2</i>) ..	109
Floréal Martorell. Nova senpaga bitalbumo de Korvaks	110
Floréal Martorell. <i>Intergalaksia</i> : Nova albumo de <i>Vojaĝo</i>	111
Floréal Martorell. <i>Banĝo Esperanto</i> : Debuta albumo de Armel Amiot	112
Paulo Sérgio Viana. Grupa legado de Dostojevskij	113
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. <i>Superforta ambicio</i> : Primovada satiro senpage elŝutebla	114
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako</i> , 2022, №1	115
<i>Literatura Foiro</i> , 2022, №316	116
<i>Literatura Foiro</i> , 2022, №317	117
La 12a literatura konkurso "Esperanto ligas homojn"	118
Aleksander Korĵenkov. <i>Unesko-Kuriero</i> pri neŭrosciencoj	119
Kiam kaj kiel la Onda redaktoro lernis Esperanton	119
Mozaiko	120
Stanislav Belov. Trinku ni po glaso!	121
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj	122
Perantoj de <i>La Ondo de Esperanto</i>	123

Kovropaĝe: Dum nia pli ol dudekjara loĝado en Baltio ni partoprenis en ĉiu BET, okazinta en Litovio, sed ĉi-jare ni ne venos al nia ŝatata renkontiĝo, ĉar EU estas fermita por ruslandanoj. Sed antaŭ, dum kaj post BET-56 ni estos tre proksime, je la suda flanko de la Kurŝa Terlango. (Foto: Konstantin Jarkov)

Dankon pro la subteno!

Por la nuna abonjaro 2022a *La Ondo de Esperanto* jam ricevis donacojn de kvar patronoj kaj 24 amikoj (unu el la amikoj ebligis abonon al tri personoj), danke al kiuj 26 personoj dum la tuta jaro ĝuas senpagan legadon de *La Ondo*. (En 2020 estis kvar patronoj kaj 18 amikoj, en 2021 – tri patronoj kaj 27 amikoj).

Legu la nomojn de la donacintoj:

Patronoj

Benoît Philippe (Germanio)

Werner Pfennig (Germanio)

Syôzi Nobuyuki (Japanio)

Geoffrey Greatrex (Kanado)

Amikoj

Angelos Tsirimokos (Belgio)

Yves Nevelsteen (Belgio)

Petr Chrdle (Ĉeĥio)

Lydia Lindla (Estonio)

Osmo Buller (Finnlando)

Tuomo Grundström (Finnlando)

Lou O'Carroll (Francio)

Pascal Dubourg Glatigny (Germanio)

Reinhard Fössmeier (Germanio)

Ingrid Gleitsmann (Germanio)

Carlos Spinola (Hispanio)

Pedro Zurita (Hispanio)

Jozefo Horvath (Hungario)

Carlo Minnaja (Italio)

Elda Dörfler (Italio)

Gražina Opulskienė (Litovio)

István Ertl (Luksemburgio)

Anastasia Otsterchil (Moldovio)

Marc van Oostendorp (Nederlando)

Leon Roijen (Nederlando)

Bård Hekland (Norvegio)

Ilona Koutny (Pollando)

Jean-Marc Lugin (Svislando)

Nicol Margot (Svislando)

Se vi deziras, ke nia almanako kaj nia ĉiutage aktualigata novaĵretejo plu funkcii kaj pliboniĝu, iĝu abonanto, amiko aŭ patrono de *La Ondo de Esperanto*.

Abonanto: 15 eŭroj | Amiko: 30 eŭroj | Patrono: 100 eŭroj.

Pri la pagomanieroj legu ĉe: <https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Dankon al ĉiuj subtenintoj, subtenantoj kaj subtenontoj!

**Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov**

Eventoj



Post du senUKaj jaroj ja okazos la 107a Universala Kongreso. Montrealo atendos vin en aŭgusto, kaj ankoraŭ eblas aliĝi kaj propraokule vidi la ĉefajn rimarkindaĵojn de la dua plej granda franclingva urbo en la mondo, inter kiuj estas la fama *Biosfero*, konstruita por la Monda Ekspozicio en 1967.

Foto: Ralf Roletschek / <http://www.roletschek.at/>

“Daŭripovo” – temo de la 99a Germana Kongreso

Ĉeestaj kongresoj kun fizika partoprenebleco ja fariĝis nekutimaj en la lastaj jaroj. En Germanio estis la unua fojo de post 2019 ke ni povis kunveni normale. Tiun ŝancon revidi unu la alian uzis preskaŭ 170 (inkluzive la paralelan junularan renkontiĝon KEKSO) partoprenantoj el ok landoj dum la pentekostaj tagoj (la 3-6an de junio) en la bela universitata urbo Oldenburg, proksime de Bremen en nordokcidenta Germanio. Aparte ĝojiga estis la aktiva partopreno de esperantistoj el apuda Nederlando. Favoris nin agrabla printempa vetero, kaj la kongresejo – ĵus nove konstruita junulargastejo kun restoracio kaj loĝeblecoj por la plimulto de la kongresanoj – estis ideala: nur por la plej grandaj eventoj necesis krome lui salonon en apuda hotelo.

Kiel kutime la kongreso ebligis statutajn kaj organizajn kunvenojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Apartan atenton ĉi-foje tamen ricevis la kongresa temo “Daŭripovo”, al kiu estis dediĉitaj entute 13 prelegoj kaj aliaj programeroj, kaj kies elekto sendube helpis akiri EU-subvencion de la germana Erasmus-agentejo. La kongreso en Oldenburg estis parto de germania-nederlanda partnera projekto, al kiu ankaŭ apartenas preparkunveno, publikigo de la kontribuoj kaj konkluda kunveno ĉi-aŭtune en Nederlando.

Daŭripova evoluigo jam de kelkaj jaroj estas temo ankaŭ inter esperantistoj. En 2020 aperis “Gvidilo al la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj” redaktita de Humphrey Tonkin kaj Rakoen Martens. La 17 Celoj de UN ne rekte mencias lingvajn demandojn, des malpli Esperanton. Sed realigo de la Celoj



Foto: Franz Kruse

postulas solidaran mondan komunumon – kiu ne povas funkcii sen komunikado. Kaj por komunikado ni havas solvon.

Aldoniĝas ke inter esperantistoj la procentaĵo de ekologie konsciaj personoj estas verŝajne pli alta ol la mezumo. Tial la organizantoj sen tro da serĉado trovis fakulojn, kiuj povis el diversaj vidpunktoj kontribui al la temo: UEA-prezidanto Duncan Charters (kiu bedaŭrinde povis nur rete partopreni) prelegis pri lingvo, komunikado kaj daŭripovo; Federico Gobbo pri daŭripova lingvopolitiko en la eŭropa kunteksto, Bert de Wit pri biodiverseco, Inge de Bruin-Kooij pri akvomastumado. Aliaj temoj estis daŭripova spacekspluatado, reaktivigo de lokaj fervojaj linioj, ekonomio de publika bono kaj pluraj aliaj.

La kongresa ekskurso kondukis nin al kleriga centro en proksima marĉo, kie Manfred Westermayer klarigis la kontribuon de marĉoj al protekto de la klimato. Ne ĉefe al daŭripovo, sed al bona etoso kontribuis la vesperaj programeroj kun muziko de Ĵenja kaj Geomar, Ralph Glomp (en Esperanto kaj la platdiĉa), *Kajto* (en Esperanto kaj la frisa) kaj Feri Floro (en Esperanto kaj la hispana). Parto de la kongresa programo estis ankaŭ sekvebla rete, kion lerte kiel ĉiam organizis Heinz Sprick.

La samaj personoj, kiuj bonege organizis la kongreson surloke, estos ankaŭ je dispono por la venonta – la centa – Germana Esperanto-Kongreso en Braunschweig, loko de la unua Germana Kongreso en 1906. La kondiĉoj (junulargastejo en la urbocentro komplete je nia dispono) tie estos similaj, la etoso espereble ankaŭ, la temo iom alia: “Amikoj tutmonde”. Kiel indas por jubilea kongreso, venontjare la lingvo kaj ĝia movado okupos pli centran lokon. Jam nun eblas aliĝi per la retpaĝo de GEA (www.esperanto.de). Gastoj kiel ĉiam estas bonvenaj.

Ulrich Brandenburg



Foto: Franz Kruse



La Hispana Kongreso okazis denove ĉeeste

Post la ekesto de la pandemio denove eblis organizi ĉeestan Hispanan Kongreson de Esperanto. Fakte okazis nur dujara prokrasto, ĉar la loko kaj la datoj estis la samaj antaŭviditaj por la kongreso de la jaro 2020, nome la urbo Comillas [Komijas] en la regiono Kantabrio ĉe la norda marbordo de Hispanio, en la festoponto de la Festo de Laboro (konkrete inter la 29a de aprilo kaj 3a de majo). Nur la numero estis malsama, ĉar fine ĝi fariĝis la 80a post okazigo de virtuala kongreso en 2021.

La listo de la aliĝintoj konsistis el pli ol 150 homoj, sed ne ĉiuj aliĝintoj en 2020 povis veni, kaj fine la partoprenantaro estis malpli internacia ol antaŭvidite. Ĉi-ŝokaze la renkonto disvolviĝis en tre gaja etoso, en kiu estis evidenta la sopiro al personaj kontaktoj post tiu ĉi speciala periodo.

La kongreson inaŭguris la urbestro de Comillas, María Teresa Noceda, kaj la skabeno pri kulturo, Pedro Velarde, kun la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, Ángel Arquillos López, kaj la prezidanto de la LKK, Miguel Gutiérrez Adúriz. La urbestro tre helpeme apogis la kongreson kaj faciligis la uzon de taŭga kulturcentro kiel kongresejo.

La programo plenis je interesaj kultureroj. Prelegis Rafael Blanco, Lorenzo Noguero, José Antonio del Barrio, Vicente Manzano, Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek), Javier Alcalde, Flo Martorell, Niko Voloshyn kaj Ana Manero. Estis prezentitaj

pluraj libroj, eldonitaj dum la pandemia periodo. Koncertis JoMo, Georgo Handzlik kaj Saša Pilipović. Tiuj ĉi lastaj organizis kabaredan spektaklon. Dum la tuta kongreso funkciis libroservo, kaj ĉirkaŭ la korto de la kongresejo estis montrita ekspozicio pri la lingvo por la ĝenerala publiko.

La lokan etoson havigis virtuala renkonto kun kantabriaj poetoj, montrantaj siajn poemojn, kiujn Miguel Fernández kaj Ana Manero prezentis Esperante, kaj elmonstro de kegloludado, tre populara sporto en tiu regiono. La antaŭkongresa ekskurso kondukis la partoprenantojn al la kaverna "El Soplao", unu el la plej grandaj en la iberia duoninsulo. La postkongresa tuttaga ekskurso sin direktis al la kantabria ĉefurbo Santandero, la mezepok-renesanca Santillana del Mar kaj la fama kaverna Altamira kaj ties muzeo (fakte la apuda kopio, ĉar la kaverna ne plu viziteblas). La kongresanoj povis ĝui dum tiuj tagoj la urbon Comillas mem, tre belan, historian kaj plenan je monumentoj kaj aliaj vidindaĵoj.

Granda parto de la kongreso estis filmata, kaj pluraj eroj estas jam iom post iom spektblaj en la jutuba kanalo de Hispana Esperanto-Federacio:

<http://www.youtube.es/esesperanto>.

La sekva kongreso okazos verŝajne post unu jaro en la urbo Sevilo.

José Antonio del Barrio



Kantas Georgo Handzlik



Foto: Peter Wraae

La Tria Skandinava Kongreso

La Tria Skandinava Kongreso de Esperanto okazis sur ŝipo inter Kopenhago kaj Oslo dum la Ĉielira semajnfino, la 27-29an de majo 2022. Kial la tria? En majo 2018 ni aranĝis la duan komunan kongreson memore al la unua tia evento antaŭ 100 jaroj, en aŭgusto 1918. La unua Skandinava Kongreso de Esperanto, aranĝita de la pioniro G. H. Backman kaj prezidata de Paul Nylén, havis lokon en Gotenburgo. Montriĝis malfacile (multekoste) celebri la centjariĝon en la sama urbo, kaj oni decidis anstataŭe elekti la pramŝipon inter Kopenhago kaj Oslo, kiu ofertas taŭgajn diversgrandajn konferencajn ĉambrojn, tranoktadon kaj manĝojn. La kongreso iĝis sukceso kaj Dana Esperanto-Asocio (DEA) deklaris sin preta aranĝi similan trilandan kongreson post tri jaroj. Tamen la koronviroza pandemio malhelpis la aranĝon en 2021, kaj ĝi estis prokrastita ĝis majo 2022.

Pro la samaj ekonomiaj kialoj ankaŭ la tria trilanda renkontiĝo okazis sur la ŝipo inter Kopenhago kaj Oslo. La programo konsistis el prelegoj, diskutoj, kunbabiladoj kaj amuza komuna vespero kun rakontoj, kantoj kaj ĉendancoj. DEA prezentis diplomon al sia longtempa kaj elstare laborema membro Ileana Schrøder, kaj NEL (Norvega Esperantista Ligo) raportis ke ĝi donis diplomon al du siaj elstaraj membroj Otto Prytz kaj Douglas Draper.

La prelegoj temis, interalie, pri “Historio de metodoj de la instruado de fremdaj lingvoj” (Bent Jensenius), “Scienco helpe al publika bonfarto. Atingoj kaj bezonoj” (Orlando Raola), “Blinduloj en la Esperanto-movado” (Otto Prytz), “Vivmedio kaj daŭrigebla socio (Gunnar Farm) kaj “Kiel mondvojaĝi per Esperanto (Heroo el Koreio), kaj kelkaj temoj kaŭzis viglajn diskutojn. En ambaŭ urboj lokaj esperantistoj ofertis gvidadon kaj ekskursojn kiam la ŝipo restis ĉe la kajo.

Ann-Louise Åkerlund

Denove internacia Ponta Festo ĉe Odro

Post dujara deviga paŭzo pro la kronviroza pandemio, denove estis rajtigita okazigo de la Ponta Festo la 1an de majo 2022 (Tago de la laboro) en la urbo Frankfurto ĉe Odro. La Esperanto-Ligo Berlin-Brandenburgio ĉi-foje havas sian informstandon rekte ĉe la rivero Odro inter malmultaj ekspoziciintoj. Ni denove ĝojis pri la morala apogo de la Popola Altlernejo de Frankfurto.

Ankaŭ ĉi-jare nia ĉefa programero estis informstando pri Esperanto. Denove eblis varbi por Esperanto. Kiel kutime ni ofertis lernolibrojn kaj vortarojn, diversajn librojn kaj fulman Esperanto-kurson en la Popola Altlernejo. Inter la libroj troviĝis nove akiritaj libroj, ekzemple, la libro *La urbomuzikistoj de Bremen*, kiun tradukis Ulrich Brandenburg, la nuntempa prezidanto de GEA.

Mi komence timis, ke mi restos tute sola dum la Ponta Festo, sed Hans Moser kun la edzino savis la honoron de Berlino. Mi estis tre surprizita pri kvinpersona esperantista grupo el Szczecin, kiu subite aperis antaŭ la stando. Ili ĝojigis preterpasantojn per bela kantado de Esperanto-kantoj. Venis ankaŭ Wolf Krüger el Eisenhüttenstadt kaj Janusz Dyda el Pollando. Do ankaŭ en 2022 la grupo estis sufiĉe internacia.

Antaŭ la informstando, kiel ĉiujare, okazis interesaj diskutoj kaj multaj homoj miris, ke Esperanto ekzistas kaj viglas. Kelkaj homoj eĉ entuziasmiĝis kaj promesis okupiĝi pri la Lingvo Internacia.

Dank' al Janusz mi sukcesis enpaki la ekspoziciaĵojn ĝustatempe. Ni ĉi-foje rezignis pri vizito de la kutima azia restoracio en la transrivera Pollanda urbo Słubice, ĉar suno kaj vento prilaboris nin dum la tuta tempo. Eble sekvafoje ni manĝu tie denove.

Ronald Schindler



VERDEN kaj AMO-seminario en Greziljono

La seminario okazis de la 31a de marto ĝis la 5a de aprilo en la Esperanto-kastelo Greziljono. Ĝi estis la dua kunsido post Parma en Italio. La seminarion surloke partoprenis 20 geesperantistoj kaj kelkaj pliaj per interreto.

La projekto VERDEN estas subvenciata de Eŭropa Unio kaj kunordigata de UEA. En ĝi kunlaboras IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) kaj TEJO-sekcio BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia), kun la subteno de Parma Esperanto-Grupo kaj Flandra Esperanto-Ligo. Temas pri internacia kunlaboro pri daŭripovo kaj transporto. Ĝi ricevas subvencion de la Nederlanda Erasmus-agentejo. En la projekto partoprenas Belgio, Ĉeĥio, Francio, Italio, Nederlando. Francesco Maurelli kunordigas la projekton nome de UEA.

La renkonton en Greziljono iniciatis la prezidantino de IFEF Rodica Todor. La seminarion malfermis Stefan MacGill. Sara Spanò kaj Francesco Maurelli konigis

la programon Erasmus+ kaj la projekton VERDEN. Sekvis pluraj prelegoj.

Jaroslav Matuška el Ĉeĥio parolis pri fakultatoj kaj projektoj, la juna studento Matěj Berka pri siaj spertoj en la projekto, Christine Brücker pri la danĝeroj de varmiĝo kaj Lars Sözüer pri efiko de la trafiko al la klimato. Rodica Todor parolis pri la politiko de EU rilate al fervojo. Bert Schumann priskribis al ni la verdan vojon sur iama fervojo ĉe Greziljono. Ladislav Hakl legis prelegon de Ladislav Kovář pri eksteraj kaj internaj kondiĉoj por daŭripova fervojtransporto. Boris Mandirola parolis pri “La Eŭropa Verda Pakto – daŭripova moviĝeblo”.

Franco Bressanin prezentis plurajn filmetojn pri agrikulturo, akvomastumado, verdaj muroj kaj verdaĵoj eĉ en trajno-vagonoj. Vito Tornillo



prezentis al ni la hibridajn trajnojn. Ambicia estas la projekto de Lars Sözüer pri retpaĝo por helpi al la planado de trajnaj vojaĝoj kun bicikloj.

Kadre de AMO-84 parolis Stefan MacGill pri fervojoj por daŭripovo. Laurent Vignaud instruis Esperanton al juna Matěj, kiu tre entuziasme mem eklernis Esperanton antaŭ kvar monatoj.

Dum libera tempo la partoprenantoj promenis en la ĉirkaŭaĵo kaj vizitis la urbon Baugé kaj ankaŭ ĝian malnovan parton kun spiral-tordita turo. Malgraŭ la ŝanĝiĝema vetero ni pasigis agrablajn tagojn inter esperantistoj.

Bongusta manĝo kontribuis al bona etoso. Bert Schumann tre bone prizorgis la ĉeestantojn.

Liba Gabalda

Volgia Esperanto-renkontiĝo en Dimitrovgrad

De la 30a de aprilo ĝis la 3a de majo en la urbo Dimitrovgrad (Uljanovska regiono, Ruslando) la duan jaron sinsekve okazis la Volgia Esperanto-renkontiĝo – VER-18. Ĉi-foje ĝi kolektis iom pli ol 20 homojn. El la najbaraj urboj Samara kaj Uljanovsk venis ok homoj; ankaŭ kvar vojaĝemaj moskvanoj el MEA MASI ne preterlasis la okazon reĝui la pasintjaran sperton.



La renkontiĝo pasis ĉefe en la rusa lingvo. La ŝanco gastigi eksterlandanojn en niaj Esperantaj aranĝoj ŝrumpas ĉiutage, kaj la spertuloj ne sukcesis reteni la Sovietian tradicion paroli Esperante inter la ruslingvanoj. Tamen inter senĉesaj tablo-ludoj, kantadoj, promenadoj, ĵongladoj, jogumadoj kaj krokodilaj babiladoj mirakle okazis ankaŭ programeroj rilataj al Esperanto.

La 30an de aprilo en la centra urba kulturdomo “Horizonto” ni vigle prezentis Esperanton al kelkaj gastoj kaj al la familianoj de la ĉefa iniciatinto de la renkontiĝo Jaroslavna (Slava) Puŝkarskaja – 16-jara junulino, esperantistiĝinta precize antaŭ unu jaro dum VER-17.

Dum la sekvaj tagoj ni organizis trejnadon por komencantoj kaj startuloj pri bellegado kaj prononcado en Esperanto, kun partopreno de ĉiuj spertaj esperantistoj. Rezulte estis sonregistritaj kelkaj citaĵoj el Esperanto-verkoj, sendendaj al la Esperanta Radio ĉe <http://s02.radio-tochka.com:4020/stream>.

Slava Puŝkarskaja okazigis du interpretistajn trejnadojn, kiujn partoprenis ĉiuj Esperanto-parolantaj ĉeestantoj kaj kiujn kun evidenta intereso aŭskultis la komencantoj kaj novuloj.

Sub la gvido de Jelena Kuznecova ni interŝanĝis opiniojn pri kontribuoj al baldaŭaj Esperanto-eventoj (pri la virtuala Kongreso de nevidantaj esperantistoj kaj pri filmado de virtualaj ekskursoj tra niaj urboj). Al la diskuto fruktodone kontribuis la novulino Julia Kuvŝinova, kiu evidentiĝis esti profesia manaĝero pri eksteraj rilatoj.

La plej granda impreso por ĉiuj estis la vizito al la vilaĝo Brigadirovka, kie nin plej kore kaj zorge gastigis la familio de Slava. Estis bela promonado en la disfloranta ĉirkaŭaĵo, fora biciklado, bongustegaj tagmanĝo kaj vespermanĝo el naturaj produktoj, malstreĉa rusa banejo, “Homlupoj” kaj tabloludoj... El la kvar infanoj de la familio nun ankaŭ la 12-jara Aleksej profunde interesiĝas pri Esperanto, sekvante la ekzemplon de sia plej aĝa fratino.


Koran dankon al la organizantoj kaj al ĉiuj partoprenantoj!

Irina Gonĉarova
Moskvo, MEA MASI

Ĝi estas demonstra versio de la 125-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



Antaŭ 500 jaroj finiĝis la unua ĉirkaŭmonda ŝipvojaĝo (1519-22). Ĝin komencis ĉ. 260 maristoj sur kvin ŝipoj, sed revenis nur 18 maristoj sur la ŝipo “Victoria”. Inter la malmultaj revenintoj estis Antonio Pigafetta, kiu detale priskribis la periplon en sia libro, kiu baldaŭ aperos en Esperanto per la traduko de Carlo Minnaja.

Foto: “Victoria” sur 16-jarcenta mapo. (Ĉiuj fotoj, kiuj garnas la artikolon de Minnaja estas prenitaj el Vikipedio.)

Celebradoj de vojaĝoj

de Carlo Minnaja

Kelkaj datoj restas en la memoro tra la jarcentoj; aliaj restas en la mallumo, sed same estis epokfaraj.

Certe ĉiuj memoras la 4an de oktobro 1957, kiam la unua sputniko orbitis ĉirkaŭ la Tero; tiu evento estis ne nur dato por la tuta homaro sed ankaŭ grava tago de la malvarma milito, en kiu konfrontiĝis vetkure la spacindustrioj de Sovetio kaj Usono.

Siavice ankaŭ epokfara estis la 12a de aprilo 1961, kiam Jurij Gagarin estis la piloto de la spacoŝipo "Vostok", kiu dum siaj 108 minutoj da veturado ĉirkaŭiris unuafoje la terglobon.

Ĉi tiuj epizodoj estas certe registritaj en ĉiuj bazlernejaj libroj, sed eble ne ĉiuj samreliefe registras la jartrion 1519-22, dum kiu unu hispana ŝipo ĉirkaŭiris unuafoje surmare la tutan terglobon. Ĉar pasis nun ĝuste duona jarmilo depost la fino de tiu vojaĝo valoras mencii, kiom grava ĝi estis kaj por la tiutempa kono de la mondo kaj por la postaj generacioj entute. Ĉi-jare plurloke estas plenumataj celebradoj de la ronda datreveno.

La itinero de la trijara Magelana ekspedicio (1519-22)



La okcidenteŭropaj popoloj deziris spicojn, kaj por igi la pladojn pli gustaj, kaj por konservi viandajn manĝoprovizojn. Tiujn spicojn oni trovis nur en teritorioj oriente de Eŭropo mem, de kiuj oni ilin kutime venigis per longaj surteraj vojaĝoj tra Azio, aŭ per ŝipoj, kiuj devis ĉirkaŭiri la kabon de Bona Espero sude de Afriko kaj direktiĝi al Hindio. Tiun maran itineron faris unue portugalo Bartolomeo Diaz en 1487, sed post la ĉirkaŭiro de la kabo ŝtormo perdigis al li la vojon; kompletan iron ĝis subordiĝo en Hindio plenumis portugalo Vasco da Gama dek jarojn poste. Estis jam la tempo, kiam la rondeco de la terglobo estis sendiskute akceptita, kaj Atlantiko logis kiel vojo eble pli mallonga por atingi la orientajn landojn vojaĝante okcidenten. Post la unua traatlantika vojaĝo de Kristoforo Kolombo en 1492, pluraj estis la esploradoj, ĝenerale en ekspedicioj finance subtenataj de la reĝoj, kies landoj havis siajn bordojn ĉe Atlantiko, kiel Anglio, Nederlando, Hispanio, Portugalio. Tio kaŭzis, flanke, ke Venecio, dum jarcentoj ĉefa komerca potenco en Mediteraneo, restis blokita de la ĉirkaŭlimigiteco de tiu maro, fariĝinta, fakte interna. Ja la veneciaj ŝipoj ne estis konstruitaj por transoceanaj vojaĝoj.

Jam la unuaj jardekoj de la dek-sesa jarcento komprenigis, ke trans Atlantiko situas granda kontinento, kiu etendiĝas ege longe sude, kiun esploris komisie de la eŭropaj ĉemaraj potencoj pluraj navigistoj, kies nomoj poste restis ligitaj al iuj teritorioj mem, kiel italo Amerigo Vespucci, kiu donis la nomon “Ameriko”, aŭ Kolumbo mem, memorata per la landnomo Kolumbio. En 1519 la hispana reĝo Karlo, poste imperiestro kiel Karlo la Kvina, financis kvinŝipan ekspedicion kiu, startinte el Seviljo, direktiĝu okcidenten, atingu la insulojn de la spicoj (Molukoj, Filipinoj) kaj revenu al la deirpunkto pasante sude de Afriko.

El tiuj kvin ŝipoj nur unu revenis: du tuj retretis, alia estis detruita de ŝtormo, la kvara haltis ĉar ĝi bezonis riparojn, kaj nur unu sukcesis reatingi la deirpunkton en Seviljo post ĉirkaŭiro de la tuta terglobo. La ĉefkapitano, portugalo Ferdinando Magelano, mortis dum batalo kontraŭ neakceptemaj vizitataj indiĝenaj popoloj en Filipinoj.

En tiu restinta ŝipo veturis helpanto de Magelano, italo Antonio Pigafetta, nobelo el Viĉenco, norditala urbo ne malproksime de Venecio; ĝuste de li estis verkita pasia kaj emociveka raporto pri la tuta ekspedicio, pri la popoloj renkontitaj kaj pri iliaj lingvoj (interesaj iuj vortolistoj, kiujn Pigafetta kompilis aŭskultante la indiĝenojn), pri la malfacilaĵoj de la vojaĝo: krom la kutimaj, okazis ribelo de hispanaj ŝipanoj kontraŭ la portugala ĉefkomandanto kun sekva sufoko de la ribelo kaj mortkondamno de la ribeluloj.

Ĝi estas demonstra versio de la 125-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La Kurŝa Terlango

de Halina Gorecka

La Kurŝa Terlango estas longa (98 km) kaj mallarĝa (0,38–3,8 km) sabla duon-insulo, situanta en la sud-orienta parto de la Balta Maro. Ĝi etendiĝas kiel arko de sud-okcidento ĉe Zelenogradsk (Ruslando) al nord-oriento ĉe Klajpedo (Litovio), dividante la Kurŝan Lagunon de la Balta Maro. La interŝtata limo dividas ĝin preskaŭ en la mezo: la suda parto apartenas al Ruslando, la norda – al Litovio.

La Kurŝa Terlango havas unikan “mikroklimaton”. Sablaj dunoj etendiĝas laŭ la marbordo kaj ilia majesteco logas multajn turistojn.

De insularo al terlango

La Kurŝa Terlango (germane: Kurische Nehrung, litove: Kuršių nerija, ruse: Куршская коса) ricevis sian nomon de la kurŝoj – balta gento, kiu donis la nomon ankaŭ al Kurlando. Ĝi estis unuafoje dokumente menciita en la jaro 1258 kiel la insulo Nestland. En 1322 ĝi aperis kun la nomo Neria Curonensis.

La unuaj homoj venis ĉi tien antaŭ kvar mil jaroj, kiam la terlango estis ankoraŭ ĉeno da arbokovritaj insuloj. Sezonaj seltejoj, en kiuj oni loĝis ĉefe dum la somera periodo, estis uzataj de antikvuloj, kies ĉefa okupo estis fiŝkaptado. La setlejo sur la loko de la nuna Nida ekzistis sufiĉe longe, ĝiaj loĝantoj okupiĝis ne nur pri fiŝkaptado, sed ankaŭ pri terkulturado kaj bredado de bestoj. Sed poste la loĝantaro de la terlango malkreskis. Probable pro la homa agado la flaŭro reduktiĝis. La terlango senhomiĝis, kaj ĝis la 9a jc mankas indikoj pri la konstanta restado de homoj en la Kurŝa Terlango.

Meze de la 13a jc la Kurŝa Terlango estis konkerita de la Teŭtona Ordeno kaj servis kiel la plej mallonga vojo inter ĝiaj nordaj kaj sudaj teritorioj, kunligante la kruckavaliran ĉefurbon Marienburg (nun Malbork), la kastelon Kenigsbergo (Kaliningrado) kaj Memel (Klajpedo). Por rebati atakojn de litovoj kaj ĵemajtoj la ordenanoj konstruis kelkajn gardkastelojn kaj brikproduktejon.

Batalo kontraŭ la sablo

La forhakado de arbaroj kaj brutbredado kaŭzis ekologian katastrofon: la vojoj, restaĵoj de arbaroj, teŭtonaj kasteloj kaj konstruaĵoj en nemultaj fiŝkaptistaj vilaĝoj iom post iom estis superŝutataj per sablo de la moviĝantaj dunoj.



La Kurşu Terlango

La unuaj laboroj por fiksi la moviĝantaj dunojn estis entreprenitaj en 1803, tiam oni komencis kunligi apartajn apudmarajn dunojn per barileto el sekaj branĉoj, konstruante etan remparon unue de Cranz (nun Zelenogradsk) ĝis la forsto Grenz (7 km), kiu detenis la sablon. La konstruado de la defenda duna linio je ĉ. 100 kilometroj estis kompletigita nur fine de la 19a jc. Apud la vilaĝo Rossitten (nun Rybaĉij) oni plantis pinojn je naŭkilometra longo, fortigante flankojn de dunoj per sabloviva herbaro.

Ĉi tiun metodon perfektigis Wilhelm Franz Epha, duna inspektisto, kiu fine venkis en la longa batalo kontraŭ la moviĝantaj dunoj. Li ekuzis pli efikan metodon, aranĝante nealtajn kvadratajn ĉelojn el branĉlignaĵo, en kiujn li enmetis pinajn plantidojn.

En 1891 post la fino de la laboroj ĉe la duno Petsch, kiu minacis superŝuti la vilaĝon Pillkoppen (nun Morskoje), la dankemaj loĝantoj donis al la plej alta punkto (62 m) de la duno la nomon altaĵo Epha kaj metis memorŝtonon omaĝe al li ĉe la poŝta vojo.

Fiŝkaptado

Fiŝkaptado estis tradicia okupo de la kurŝoj. Post la invado de la Teŭtona Ordeno la rajto fiŝkapti en la laguno kaj en la maro apartenis al la ŝtato, kaj ĝi estis donacata aŭ aĉetata kontraŭ la fiksita prezo. Eksterleĝa fiŝkaptado estis punata, same kiel blasfemado kaj interbatiĝo en la laguno, dimanĉa fiŝkaptado, fiŝkomercado dum diservo kaj multo alia.

La ŝiparo en la Kurŝa Laguno ĝis la mezo de la 20a jarcento estis vela. Karakteriza trajto de la kurŝaj boatoj (kuren) estis la plata fundo, ebliganta albordiĝon, ili havis zorge pripensitan sistemon de veloj kaj flankan kilon, kiu ebligis manovradon.

Birda Ponto

Tra la Kurŝa Terlango pasas birda migrovojo. La nomon Birda Ponto ĝi ricevis pro tio, ke la plumhavaj migrantoj haltis ĉi tie por ripozi kaj manĝi. Dum la tagoj de amasa migrado super la terlango flugas ĝis unu miliono da birdoj. Inter ili estas raraj specioj. La mallarĝa kaj longa sabla strio iĝis tre oportuna loko por observi birdojn.

Ĝi estas demonstra versio de la 125-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



ESPERANTO
Monda lingvo por
dialogo, ne por milito

ESPERANTO-TAGO
26-07-2022

Lernu Esperanton,
ne la lingvon de milito

lernu!



VIKIPEDIŬ
La libera enciklopedio



uea

Antaŭ 135 jaroj, la 26an de julio (Julie: la 14an) 1887 en Varsovio aperis la “Unua Libro” de d-ro Esperanto. Ĉi tiun daton la adeptoj de Esperanto festas kiel la naskiĝdaton de Esperanto. Kiel kutime, Esperanto-aktivuloj kreis kaj disvastigas porokazan afiŝeton en pluraj lingvoj. Elŝutu ĉe <https://espereto.com/informiloj/>

Jubileoj kaj memordatoj en julio 2022

4. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Helmi Dresen** (1892-1912-1941), estona instruistino, urbestarano de Talino dum la Sovetunia periodo, kaj esperantistino nomita “la animo de la estonia Esperanto-movado”; Esperanto-instruistino, ĉefdelegito de UEA en Estonio, kunfondinto de Esperanto-Asocio de Estonio (1922) kaj ties sekretario ĝis 1940, membro de la Lingva Komitato (LK, 1926-41); kunaŭtoro de Esperanto-estona vortaro (1927) kaj kunlaboranto de *Estona Antologio* (1932); fratino de la Esperanto-poetino Hilda Dresen. Murdita de nazioj en 1941.

4. Antaŭ 35 jaroj mortis **Tiberio Morariu** (1901-1921-1987), rumana esperantisto dum preskaŭ 60 jaroj loĝinta en Svedio. Fondinto kaj direktoro de Rumana Esperanto-Instituto (1924-28), ĉefdelegito de UEA por Rumanio, unu el plej popularaj Cseh-instruistoj – ĝis 1934 li instruis Esperanton en ĉ. cent kursoj por ĉ. kvin mil kursanoj en pluraj landoj; tradukinto de *Niĉjo Mensogulo* (I. A. Brătescu-Voinești, 1927), *Nobela peko* (M. Sadoveanu, 1929), *Sonorilo kaj kanono* (E. Isac, 1930).

8. Antaŭ 20 jaroj mortis **Bruno Vogelmann** (1909-1926-2002), germana instruisto, entreprenisto, socia aganto kaj esperantisto; utiliganto de Esperanto en komercaj kontaktoj kun eksterlando, i. a. per Esperantaj varetikedoj, kunfondinto de Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (1962); aŭtoro de *Esperanto en komerco* (1962), *Internacia komerca-ekonomia vortaro en naŭ lingvoj* (Kun F. Munniksma k. a., 1974), *La nova realismo: La konsekvenco de la nova pensado* (1989), *Internacia komerca-ekonomika vortaro en 11 lingvoj* (Kun F. Munniksma k. a., 1990); honora membro de UEA (1984), laŭreato de la premio Onisaburo Deguchi (1992) kaj de la Esperanto-Kulturpremio de Aalen kaj FAME (1993).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 293-294).

9. La 9an de julio en Klajpedo (Litovio) komenciĝos la **56aj Baltaj Esperanto-Tagoj**.

- Legu pli pri BET-56 en nia novaĵretejo <https://sezonoj.ru/bet/>.

14. Antaŭ 20 jaroj (2002) en Kaliningrado komenciĝis la **1a Balta Esperanto-Forumo** – la unua internacia esperantista renkontiĝo en la plej okcidenta Ruslanda regiono.

15. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Victor Sadler** (1937-1951-2020), brita filologo, programisto kaj esperantisto, plejparton de sia vivo loĝinta en Nederlando; redaktoro de *Esperanto* (1962-74) kaj *La Monda Lingvo-Problemo* (poste *Language Problems and Language Planning*, 1969-72), direktoro de la Centra Oficejo de UEA (1968-

80), ĝenerala direktoro de UEA (1980-83), estrarano de UEA (1986-87); membro de AdE (1970-83); prizorganto de la projekto Distribuita Lingva Tradukado en kiu Esperanto ludis kernan rolon (1985-90); aŭtoro de du poemaroj (*Memkritiko*, 1967; *Perversaj rilatoj*, 2015), terminaro pri budhismo (1962), Esperanto-sinhala vortaro (1963) kaj de multaj fakaj studoj pri DLT.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 245-246).

18. Antaŭ 65 jaroj naskiĝis **Valentin Melnikov** (1957-1982-), ruslanda kemiisto, aktivulo de “intelektaj ludoj” kaj esperantisto; poeto, tradukanto kaj recenzanto; laŭreato de literaturaj konkursoj, aŭtoro de la poemaro *Ni vivas malgraŭ ĉio* (2021), tradukinto de *Eŭgeno Onegin* de Puŝkin (2005), antologio *El la rusa poezio* (2019) k. a.; redaktoro de *Cerbe kaj Kore* (1998-2000), membro de AdE (2019-).

19. Antaŭ 25 jaroj (1997) en Adelaido komenciĝis la **82a Universala Kongreso de Esperanto** – la unua UK en Aŭstralio.

19. Antaŭ 20 jaroj mortis **Nikola Aleksiev** (1909-1924-2002), bulgara ĵurnalista, socia aganto, vicprezidanto de Bulgaria societo por amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlando; la ĉefa gvidanto de la Esperanto-movado en la socialisma Bulgario, prezidanto de BEA (1964-76), prezidanto de LKK de UK-48 (Sofio, 1963) kaj de UK-63 (Varna, 1978), prezidanto de MEM (1963-78), komitatano de UEA (1963-80), aŭtoro de pluraj libroj en/pri Esperanto.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 13-14).

23. Antaŭ 155 jaroj naskiĝis **Edgar von Wahl** (1867-1887-1948), baltgermana instruisto, ruslanda mararmea oficiro kaj interlingvisto, pioniro de Volapük kaj Esperanto, aŭtoro kaj tradukanto (interalie, de *Principino Mary* de Lermontov), forlasinta Esperanton pro nerealigo de reformoj, kunlaboranto de la interlingvistika revuo *Kosmoglott*, aŭtoro de la planlingvo Occidental (Interlingue, 1922).

26. Antaŭ 135 jaroj (1887) en Varsovio aperis la “Unua Libro” de Lazarj Markoviĉ “Ludoviko” Zamenhof – la naskiĝdato de Esperanto.

26. Antaŭ 75 jaroj (1947) en Berno komenciĝis la **32a Universala Kongreso de Esperanto** – la unua postmilita UK, en kiu okazis reunuiĝo de IEL kaj UEA.

Ĝi estas demonstra versio de la 125-paĝa junia Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



Aleksandr Kuprin estas la dua aŭtoro, prezentata en nia literatura projekto “Rusa Novelaro 2”, en kiu aperas mallongaj prozaj verkoj de rusaj aŭtoroj de la 20a jarcento.

Aleksandr Kuprin

Li estis ŝarĝisto, helpforĝisto, ŝtaluzina laboristo, tornisto, hejtisto en ŝipo, geometro, psalmisto, gurdisto, reklamisto, ekonomo, dentisto, korektisto, kompostisto, ĵurnalisto, porblindula instruisto, kulturanto de tabako... Li sportis, aviadis kaj subakviĝis en maro. Li vivis inter trampoj, policaj spionoj, mirgantaj cirkistoj kaj ŝtelistoj, li drinkis, blagis kaj skandalis. Krome li verkis, kaj surbaze de liaj verkoj oni produktis tridekon da filmoj. Lia nomo estas Aleksandr Kuprin.

Aleksánder Ivánoviĉ Kuprín (Александр Куприн) naskiĝis la 26an de aŭgusto (Gregorie: la 7an de septembro) 1870 en Narovĉatov, Penza gubernio. Lia patro, malgrava oficisto el nobela sed neriĉa familio, mortis baldaŭ post lia naskiĝo, kaj lia patrino, despotema virino el tataara princa familio, fuĝante de mizero ekloĝis en Moskvo kun la filo kaj du filinoj. Aleksandr lernis en pensionato por orfoj (1876-80), armea gimnazio (kadeta lernejo, 1880-88) kaj infanteria oficira lernejo (1888-90), kiun li finis kiel leŭtenanto.

Post kvarjara armea servo Kuprin en 1894 forlasis la armeon kaj dum kelkaj jaroj migris tra suda Ruslando, ŝanĝante profesiojn, kies neplenan liston vi legis ĉi-supre. Lia unua rakonto *La lasta debuto* aperis en 1889; pro ĝi li ricevis honorarion kaj dutagan enkarcerigon pro lezo de la lerneja statuto, la studentoj devis ricevi permeson de la estraro por publikigotaj tekstoj. Sekvis pliaj verkoj, kaj la verkado iom post iom iĝis lia profesio.

En 1901 Kuprin ĉesigis sian nomadan vivon kaj ekloĝis en Peterburgo. Liaj verkoj populariĝis kaj en 1905 post la aperigo de la romaneto *La duelo* (Поединок) al li venis famo. Sekvis la pribordela romaneto *La kavo* (ni ne diskutu la titolon, 1909, 1914-15), la romanetoj *La grenata braceleto* (1910) kaj *La stelo de Salomono* (1917), pluraj rakontoj kaj noveloj. Neatendite, drinkulo kaj skandalulo Kuprin famiĝis kiel aŭtoro de ĉarmaj porinfanaj rakontoj, kaj plej bonaj el ili (*Elefantido*, *Blanka pudelo* k. a.) estis reeldonitaj ne dekojn, sed centojn da fojoj.

La milito kaj revolucio ruinigis lian brilan karieron. Fine de 1919 Kuprin forlasis Ruslandon kaj ekloĝis en Parizo, daŭre verkante, tamen por legantaro nekompareble malpli granda ol en Ruslando, kaj li vivis rande de mizero, savante sin en drinkado. En 1937 Kuprin revenis al Ruslando kaj estis triumfe renkontita kiel vivanta klasikulo, sed li preskaŭ nenion verkis kaj mortis la 15an de aŭgusto 1938, nur 15 monatojn post la reveno.

Sur la sekvaj paĝoj vi povas legi kvar liajn rakontojn: fruaj *Siringo* kaj *Viando*, *Helenjo* el lia glora tempo kaj *Nokta violo* – unu el liaj lastaj Parizaj rakontoj. Bedaŭrinde, mankas lia plej populara rakonto *Gambrinus* (1907), sed pro ĝia amplekso nia 30-paĝa kolekto iĝus kvindek-paĝa – iom tro por tiuj, kiuj abonas *La Ondon* ne nur por legi beletraĵojn.

Mi dankas al Ludmila Novikova kaj Vladimir Jurganov pro ilia kunlaboremo kaj al Ilja Smykov pro liaj konsiloj.



Aleksander Korĵenkov

Aleksandr Kuprin

SIRINGO

Nikolao Jevgrafoviĉ Almazov apenaŭ sukcesis atendi, ke la edzino malfermu por li la pordon, kaj, sen demeti la mantelon, kun la kaskedo surkape iris en sian kabineton. La edzino, ekvidinte lian mornan vizaĝon kun la kunŝovitaj brovoj kaj suba lipo nerve kunpremita per la dentoj, tuj komprenis, ke okazis granda malfeliĉo... Ŝi silente sekvis sian edzon. En la kabineto Almazov dum ĉirkaŭ unu minuto senmove staris, rigardante en angulon. Poste li ellasis el la manoj sian teknon, kiu falis sur la plankon kaj malfermiĝis, kaj li mem ĵetis sin sur fotelon, kolerege krakinte siajn kunmetitajn fingrojn...

Almazov, juna neriĉa oficiro, studis en la akademio de la armea ĉefstabo kaj ĵus revenis de tie. Hodiaŭ li prezentis al sia profesoro la lastan kaj plej malfacilan praktikan laboron – geodezian planon de tereno...

Ĝis nun ĉiuj ekzamenoj estis sukcese plenumitaj, kaj nur Dio kaj la edzino de Almazov sciis, per kiuj pezaj penoj ili estas faritaj... Ni komencu de tio, ke eĉ lia aliĝo al la akademio unue ŝajnis neebla. Dum du sinsekvaj jaroj Almazov solene fiaskis ĉe la enira ekzameno, kaj nur je la tria jaro danke al sia persista laboro li superis ĉiujn barojn. Se li ne havus la edzinon, li eble ne trovus en si sufiĉan energion kaj rezignus pri ĉio. Sed Verocka ne permesis al li perdi la kuraĝon kaj konstante subtenis lian optimismon... Ŝi lertiĝis akcepti ĉiun lian fiaskon kun klara, preskaŭ gaja vizaĝo. Ŝi rifuzis al si ĉion bezonatan, por ke ŝia edzo havu komforton, eble ĉipan, tamen bezonatan por la homo okupiĝanta pri mensa laboro. Ŝi, laŭ bezonoj, estis lia kopiistino, desegnistino, legistino, repetitorino kaj notlibro.

Pasis ĉirkaŭ kvin minutoj da peza silento, kiun rompis nur la enuige lamanta tiktako de la vekhorloĝo, delonge konata kaj teda: unu, du, tri-tri: du karaj batoj kaj unu kun raŭka kromsono. Almazov sidis, sen demeti siajn mantelon kaj ĉapon kaj turninte sin flanken... Vera staris je du paŝoj de li kaj same silentis kun turmento sur sia bela, nervoza vizaĝo. Finfine ŝi la unua ekparolis, kun tia atentemo, kun kiu parolas nur virinoj ĉe la lito de grave malsana proksimulo...

– Kolja, kio pri via laboro?... Ĉu malbone?

Li nervoze movis la ŝultrojn sed ne respondis.

– Kolja, ĉu oni malakceptis vian planon? Diru, ni ja tutegale kune pridiskutos.

Almazov rapide turnis sin al la edzino kaj ekparolis arde kaj kolere, kiel kutime oni parolas, eldirante longe kaŝatan ofendon.

– Jes, jes ja, oni malakceptis ĝin, se vi nepre volas scii. Ĉu vere vi mem ne

vidas? Ĉio iris al diablo!.. Ĉi tiu tuta rubo – li kolere puŝis sian piedon al la teko kun la desegnaĵoj, – ĉi tiu tuta rubo povas esti ĵetita en la fornon! Jen la akademio! Post monato mi devos reveni en la regimenton, reveni kun bruaĉo kaj malhonoro. Kaj ĉi ĉio pro iu damnita makulo... Ho, diablo!

– Kiu makulo, Kolja? Mi nenion komprenas.

Ŝi eksidis sur apogilon de la fotelo kaj brakumis la kolon de Almazov. Li ne rezistis, sed plu rigardis en la angulon per ofendita mieno.

– Sed kiu makulo, Kolja? – ŝi denove demandis.

– Aĥ, banala makulo, de verda inko. Vi ja scias, ke mi nokte ne enlitiĝis ĝis la tria, ĉar mi devis fini la laboron. La plano estas bonege desegnita kaj kolorigita. Ĉiuj diras tion. Nu, mi hieraŭ laboris tro longe, laciĝis, la manoj ekstremis – kaj mi metis makulon... Tre densan makulon... grasan. Mi komencis purigi, sed nur vastigis ĝin. Mi komencis pensi, kiel eblas korekti, kaj decidis sur tiu loko desegni amason da arboj... La rezulto estis tute sukcesa, kaj neniu komprenus, ke tie estis makulo. Hodiaŭ mi alportis ĝin al la profesoro. “Jes, jes, bone... De kie ĉe vi, leŭtenanto, ĉi tie aperis arbustoj?” Mi devus rakonti ĉion, kio kaj kiel okazis. Eble li nur ridus... Tamen ne, li ne ridus – li ja estas akurata germano, pedanto. Mi do diras al li: “Tie efektive arbustoj kreskas”. Sed li diras: “Mi ĉi terenon scias, kiel miajn fingrojn, kaj ĉi tie ne povas esti arbustoj”. Vorto sekvis vorton, nia interparolo akriĝis. Krome, apude estis multaj niaj oficiroj. “Se vi asertas, – li diras, – ke en ĉi tiu intermonto estas arbustoj, bonvolu morgaŭ rajdi tien kun mi... Mi pruvos al vi, ke vi maldiligente laboris fuŝe, aŭ kopiis la planon rekte de triversta mapo...”

– Sed kial do li tiel senhezite diras, ke tie mankas arbustoj?

– Dio mia! Kial? Vi faras iajn infanajn demandojn. Tial do, ke li jam dum dudek jaroj konas ĉi tiun lokon pli bone, ol sian propran dormejon. La plej aĉa pedanto el ĉiuj pedantoj de la mondo, kaj aldone: germano... Kaj finfine rezultos, ke mi mensogas kaj komencas palavri... Krome...

Dum la tuta konversacio li prenis el la cindrujo, staranta antaŭ li, uzitajn alume-tojn kaj disrompis ilin je eretoj, kaj eksilentinte, kolere ĵetis ilin sur la plankon. Estis videble, ke ĉi tiu forta homo estas ploronta.

La geedzoj longe sidis en peza cerbumado, dirante neniun vorton. Subite Veročka per energia movo saltis de sur la fotelo.

– Aŭskultu, Kolja, ni devas tuj veturi! Rapide vestu sin.

La vizaĝo de Nikolao Jevgrafoviĉ sulkiĝis, kvazaŭ pro netolerebla fizika doloro.

– Aĥ, Vera, ne parolu stultaĵojn. Ĉu vi vere opinias, ke mi venos al li por senkulpigi min kaj peti pardonon? Tio signifas, ke mi per mia mano subskribos kondamnon pri mi. Bonvolu ne fari stultaĵojn.

– Ne, ne stultaĵoj. – Vera protestis, frapante la plankon per sia piedo. – Neniu devigas vin viziti lin kun pardonpetoj... Sed simple, se tie mankas tiuj stultaj arbustoj, ni devas tuj planti ilin.

– Ĉu planti?.. Arbustojn?.. – Nikolao Jevgrafoviĉ larĝe malfermis la okulojn.

– Jes, planti. Ĉar vi diris malveron, necesas korekti ĝin. Preparu vin, donu al mi la ĉapeleton... La bluzon... Vi serĉas en misa loko, rigardu en la ŝranko... La ombrelon!

Dum Almazov, kiu provis kontraŭi, sed ne ricevis atenton, estis serĉanta la ĉapeleton kaj la bluzon, Vera rapide elŝovis kestojn de tabloj kaj komodoj, eltiris korbojn kaj skatolojn, malfermis ilin kaj disĵetis laŭ la planko.

– Orelringoj... Nu, ili estas bagatelaj... Kontraŭ ili oni donos nenion... Sed ĉi ringo kun solitero kostas multe... Nepre ni devos elaĉeti ĝin... Mi bedaŭros, se ĝi malaperos. La braceleto... ankaŭ kontraŭ ĝi oni donos nemulte. Ĝi estas malnova kaj fleksita... Kie estas via arĝenta cigaredujo, Kolja?

Post kvin minutoj ĉiuj juvelaĵoj estis metitaj en retikulon. Vera, jam vestita, lastfoje pririgardis ĉion ĉirkaŭe por certiĝi, ke ili nenion forgesis hejme.

– Ni veturu, – finfine ŝi rezolute diris.

– Sed kien ni veturu? – provis protesti Almazov. – Baldaŭ iĝos mallume, sed ĝis mia tereno estas preskaŭ dek verstoj.

– Stultaĵoj... Ni veturu!

Antaŭ ĉio Almazovoj vizitis lombardejon. Estis videble, ke la lombardisto tiel delonge kutimiĝis al ĉiutagaj scenoj de homaj misfortunoj, ke ili tute ne tuŝis lian koron. Li tiel skrupule kaj daŭre esploris la alportitajn aĵojn, ke Veroĉka komencis perdi la sinregon. Precipe forte li ofendis ŝin per tio, ke li ekzamenis la ringon kun diamanto per acido, pezis ĝin kaj taksis ĝian valoron nur je tri rubloj.

– Ja ĝi estas vera diamanto, – Vera indignis, – ĝi kostis tridek sep rublojn, kaj je tre favora oferto.

La taksisto kun aspekto de laca indiferento fermis siajn okulojn.

– Por mi tio ne gravas, sinjorino. Ni tute ne prenas ŝtonojn, – li diris, ĵetante la sekvan aĵon sur la pesilteleron, – ni taksas nur metalojn.

Sed la malnova kaj fleksita braceleto, tute neatendite por Vera estis taksita tre multekoste. Entute ili ricevis ĉirkaŭ dudek tri rublojn. Ĉi tiu sumo estis pli ol sufiĉa.

Kiam Almazovoj venis al la ĝardenisto, la peterburga blanka nokto jam ster-niĝis sur la ĉielo kaj en aero kvazaŭ blua lakto. La ĝardenisto, eta maljuna ĉeĥo kun oraj okulvitroj, ĵus atabliĝis kun sia familio por vespermanĝo. Li tre miregis kaj estis malkontenta pro la malfrua vizito de klientoj kaj pro ilia ekstravaganca peto. Verŝajne li suspektis iun mistifikon kaj tre seke respondis al persistaj petoj de Veroĉka:

– Pardonu min. Sed dum nokto mi ne povas sendi miajn laboristojn en tian foron. Se vi bonvolos morgaŭ matene – mi estos je via servo.

Do restis nur unu rimedo: detale rakonti al la ĝardenisto la tutan historion pri la malfeliĉiga makulo, kaj Veroĉka tion faris. La ĝardenisto komence aŭskultis nekredeme, preskaŭ malamike, sed kiam la rakonto de Vera atingis la momenton, kiam ŝi ekhavis la ideon planti arbuston, li ekaŭskultis pli atente kaj kelkfoje kunsente ridetis.

– Nu, restas farenda nenio alia, – konsentis la ĝardenisto, kiam Vera finis sian rakonton, – diru, kiujn arbustojn ni al vi plantu?

Tamen el ĉiuj specoj, kiujn la ĝardenisto havis, neniu estis taŭga: vole-nevole ili devis fari elekton favore al arbustoj de siringo.

Vane Almazov persvadis la edzinon reveni hejmen. Ŝi veturis kun la edzo, kaj dum la tuta tempo, kiam oni plantis arbustojn, ŝi arde klopodis senorde kaj malhelpis al la laboristoj, kaj konsentis reveni hejmen nur post kiam certiĝis, ke la herbotapiŝon ĉe la arbustoj oni ne povas distingi de la herbo, kiu kovris la tutan intermonton.

Dum sekva tago Vera tute ne povis sidi hejme kaj eliris straten por renkonti la edzon. Ŝi eĉ de malproksime, nur pro lia vigla kaj iom saltetanta paŝmaniero, komprenis, ke la historio pri arbustoj finiĝis sukcese... Kaj vere, Almazov estis tute kovrita de polvo kaj apenaŭ povis stari pro laco kaj malsato, sed lia vizaĝo brilis pro triumfo de perbatalita venko.

– Bone! Bonege! – li kriis de dek paŝoj responde al la alarmita mieno de la edzina vizaĝo. – Imagu, mi kaj li venis al la arbustoj. Nu, li fikse kaj longe rigardis ilin, eĉ plukis folion kaj maĉis ĝin. “Kiu arbo ĝi estas?” – li demandas. Mi diras: “Mi ne scias, via profesora moŝto!” – “Betulo, eble?” – li diras. Mi diras: “Eble betulo, via profesora moŝto”. Tiam li turnis sin al mi kaj eĉ donis sian manon. “Pardonu, li diras, min, leŭtenanto. Verŝajne mi komencas maljuniĝi, se mi forgesis pri la arbustoj”. Li, la profesoro, estas bonega kaj tre saĝa. Vere, mi bedaŭras, ke mi lin trompis. Li estas unu el la plej bonaj niaj profesoroj. Liaj scioj estas terure grandaj. Kaj lia rapideco kaj precizeco pri taksado de tereno estas mirinda!

Sed por Vera ne sufiĉis tio, kion li rakontis. Ŝi devigis lin denove kaj denove rerakonti al ŝi detale la tutan konversacion kun la profesoro. Ŝi interesiĝis pri plej malgravaj detaloj: kian esprimon havis la vizaĝo de la profesoro, kun kia tono li parolis pri sia maljuneco, kion Kolja mem sentis dum tio...

Kaj ili iris hejmen tiel, kvazaŭ krom ili neniu estis sur la strato: ili tenis manojn unu de la alia kaj senhalte ridis... Preterpasantoj mirigite haltis por plian fojon rigardi la strangan paron...

Ankoraŭ neniam Nikolao Jevgrafoviĉ tagmanĝis kun tia apetito, kiel dum tiu ĉi tago... Post la tagmanĝo, kiam Vera alportis glason da teo en la kabineton de Almazov, la geedzoj subite samtempe ekridis kaj ekrigardis unu al la alia.

- Pri kio vi ridas? – demandis Vera.
- Kaj vi pri kio?
- Ne! Vi unue diru, sed mi poste.
- Nu, stultaĵoj. Mi rememoris la tutan historion pri la siringo. Kaj vi?
- Same stultaĵoj, kaj same pri la siringo. Mi volis diri, ke ekde nun siringo por ĉiam estos mia plej ŝatata floro...

VIANDO

I

Boriso Polubojarinov, medicina studento, kiel ĉiam, vekiĝis matene iom post la sepa horo. Kvankam la suno ankoraŭ ne aperis, en la korto estis lume; la arabeskoj, glaciigintaj sur la fenestraj vitroj – neĝkovritaj abietoj, tombokrucoj kaj palmoj – akceptis la delikatan rozan koloron de l' aŭroro. La tago promesis esti frosta kaj suna.

Boriso salte ellitiĝis kaj rapide, kun la sento de la sana freŝo kaj juna forto en sia tuta korpo, komencis fari sian kutiman tualeton. Antaŭ ĉio estis forta malvarma duŝo, kiu devigis lin skuiĝi kaj laŭte ridi, poste okazis duonhora ekzercado kun halteroj kaj gimnastiko, sekvis zorga okupiĝo pri la dentoj kaj ungoj, kaj finfine – dek antaŭspegulaj minutoj, dediĉitaj al la hararanĝo, kravato, kaj al la junulecaj, apenaŭ videblaj nigretantaj lipharoj.

Fininte sian tualeton, Boriso sonorigis. Laŭ la delonge establita kutimo, la lakeo alportis al li kvar ĵus molkuiritajn ovojn, kovritajn per tuko, malvarman viandon, boteleton da angla portero kaj teon. Boriso, kiu vige interesiĝis pri higieno kaj legis ĉion, kio estis publikigita ĉe ni kaj eksterlande, jam dum unu jaro aranĝis sian vivon en la limoj de la severa kaj strikta reĝimo: akurateco en la tempoplanado, diversspeca kaj diversforma sporto, bona nutrado kaj manko de superfluaĵoj kaj ekscitiĝoj. Pro la socia pozicio kaj pro la konatoj de siaj gepatroj Boriso apartenis al la fermita kaj tre malgranda rondo de la aristokrataj studentoj el la urbo N. Ĉi tiu rondeto, preninte kiel modelon la aristokratajn rondetojn de Kembriĝo kaj Oksfordo, havis nenion komunan kun tiuj studentoj, kiuj akiris por si tre malbonan reputacion pro siaj blankaj subŝtofoj[1], kripligita malstreĉa prononcado, skandaloj, stultaj heroaĵoj kaj laŭta montrado de la pseŭdopatriotaj sentoj. La rondeto de Boriso antaŭ ĉio cetera postulis de la membroj absolutan ĝentilecon, kaj la kapablon teni sin kun tia eleganta kaj senriproĉa simpleco, kiu servas kiel la plej bona pruvo de la edukiteco kaj bontono. Princo Belyj-Pogoreljskij, kiel la plej rafinita tipo de la vera ĝentlemano, tiurilate estis la unua, kiu tiusfere montris al siaj kamaradoj nesupereblajn ekzemplojn de l' deco. Li ĝuis la estimon de la tuta rondeto, en delikataj okazoj oni apelaciis al li, kiel al la arbitracianto, oni elektis lin delegito por ĉiuj riskaj entreprenoj, kiam necesis uzi la faman nomon kaj kontaktojn. Tamen princo Pogoreljsky[2] ĉiam restis je granda distanco de la simplaj mortemuloj. Boriso sekrete adoris la princon kaj diligente kopiis la fasonon de liaj paltoj kaj lian ĉarman simplecon en la komunikado; ankaŭ de li Boriso reprenis la egoisman pasion al la korpa higieno kaj al sporta ekzercado. Sed Boriso sentis, ke li neniam povos atingi la altecon de sia modelo. Princo Belyj-Pogoreljskij mirinde bone skermis per rapiro, naĝis kiel

profesiulo, remis kiel maristo, gajnis du biciklistajn rekordojn, levis ambaŭmane kvinpudan metalan halteron, parolis france kiel parizano, kaj senlace piedmarŝis, kvankam antaŭ nelonge lia patro donacis al li paron da bonegaj nigraj trotĉevaloj. Neniu el liaj neproksimaj konatoj kuraĝus veni al princo Pogoreljskij, brakumi lian talion kaj familiare diri: “Ecoutez, cher ami”[3], kiel antaŭ nelonge en la fumejo rilate al Boriso kondukis Telegin – vanta dandaĉo kaj skandalulo el la medio de negocistaj filoj. Sed malgraŭ ĉio Boriso sentis plezuron pro tio, ke li estas tiel varme akceptita en la rondon de princo Belyj.

Post la matenmanĝo Boriso konsultis sian agendon, en kiu ĉe ĉiu dato anticipis skribis sur blanka folio la farendaĵojn por la koncerna tago. La hodiaŭa tago estis ne tre dense planita: “Dissekcejo nepre”, “Lekcio de T.”, “Vespere ĉe V. K.”. Pro la unua noto Polubojarinov kun abomeno grimacetis: sian viziton de la dissekcejo li pro iu stranga hezitemo jam longe estis prokrastanta de tago al tago, kaj pro tio li fine eĉ ricevis riproĉeton de sia profesoro. Sed la lasta noto – “vespero ĉe V. K.” – vekis sur la lipoj de Boriso kontentan rideton. Ĉi tiuj inicialoj signis la edzinon de unu el la amikoj de lia patro. Boriso antaŭ nelonge, nur antaŭ ĉirkaŭ du monatoj intimiĝis kun ŝi. Antaŭhieraŭ li eksciis, ke ŝia edzo hodiaŭ estis veturonta oficvojaĝe, kaj pro tio plenaj du diurnoj estis je la dispono de Boriso.

II

La mateno estis sennuba, briletanta. La neĝo, falinta nokte kaj ankoraŭ de sulkita de sledoj, kuŝis kiel glataj kovriloj, rozaj sub la suno kaj bluetaj en la ombro. En la travidebla aero fajreris frosto, inundanta la gorĝon dum la spirado.

Boriso marŝis direkte al la dissekcejo per grandaj gimnastikaj paŝoj, ŝovinte la manojn en la poŝojn de sia somera palto (la kutimon surmeti someran palton dum la vintro li reprenis de princo Belyj, kiu en tio ankaŭ imitis gvardiajn oficirojn). Ĝojigis lin la sennuba mateno, kaj la sento de vigecco kaj sano en ĉiuj membroj, kaj la gaja, sonora knarado de la neĝo sub la piedoj. En kelkaj lokoj la elasta neĝo tiel kompaktiĝis, ke ĝi sonoris sub la kalkanumo kiel gisfera plato. De tempo al tempo Borison devancis fiakristaj sledoj sur jelpo grincantaj glitiloj, sed li ne volis surslediĝi – Boriso konsideris la marŝadon kiel fizikan ekzercadon.

Ĝi estas demonstra versio de la 125-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La vojaĝoj de Telma

de Ewa Grochowska



La vojaĝon al Argentino Georgo preparis dum kelkaj monatoj. Tri noktojn antaŭ la foriro, ekscitita, trafita de raisefiebr* li ne plu dormis. Lastmomente, li jen elmetis, jen denove enmetis en la grandan valizon diversajn vestaĵojn, pripensante la klimatan diferencon inter Bonaero kaj Patagonio. Dikaj, lanaj puloveroj miksiĝis kun T-ĉemizetoj kaj ŝortoj. Pro la manko de spaco, la botoj batalis kontraŭ la sportŝuoj kaj malebligis fermi la valizon. Evidentiĝis, ke li devas elekti. Iom kolera, li elĵetis la botojn.

Telma imagis Georgon, kiu neniam kapablis pretigi sian valizon kaj ekridis. Tamen la momentan amuzon anstataŭis granda malgajeco. Ŝi nevole suspiris, verŝis kelkajn larmojn. La pasintan jaron, ili revis kune pri tiu vojaĝo. Georgo konigis al Telma la daton de sia foriro, do ŝi sekvis ĉiutage lian itineron. Kiam ŝi sciis, ke li atingis El Calafate, subita, nerezistebla impulso puŝis ŝin troviĝi tie, kie estas la amata viro.

Alveninte al la naturparko Los Glaciares la lastan tagon de januaro, Telma surprize malkovris la masivojn de florantaj, bluaj kaj rozaj lupenoj. Nu, nenio stranga, dum la aŭstrala somero en Patagonio la vetero estas pli milda ol tiu en Berlino. Tamen, pro rapida, nepripensita decido pri vojaĝo, la vestoj de Telma ne taŭgis por la surlaga ŝipekskurso. Ŝi iris en la plej proksiman hotelon, senbrue enŝoviĝis en ĝian vestejon kaj prunteprenis longan peltaĵon kun kapuĉo. Poste, envolvita en la varma mantelo, ŝi kuratingis la enbusiĝantan turistaron. Ŝi ne provis trovi Georgon. Male, ŝi mallevis la kapon por kaŝi sian vizaĝon.


* Antaŭforira febro (*germ.*).

Ĝi estas demonstra versio de la 125-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La venĝo

de Paulo Sérgio Viana



Ni ĉiuj estis inter naŭ- kaj dekjaraĝaj. Tiam ne ekzistis videoludoj. Ekzistis nur vitraj globetoj, kajtoj, kolekto de futbalbildoj kaj... futbalo. Sovaĝa surstrata futbalo, futbalo en malplenaj terpecoj en la urbo, futbalo en la domkorto, en la koridoro ekster la domo. Ni ludis futbalon matene, posttagmeze, kaj foje vespere, meze de vespertoj, kiuj flugadis inter ni. Ĉiam troviĝis iu disponebla bubo, almenaŭ por matĉo de du ludantoj kontraŭ du ludantoj, post tri goloj oni inversigis la poziciojn de la teamoj, post ses goloj finiĝis la ludo. Kiu ludis sovaĝan futbalon, tiu scias pri kio mi parolas. La plej fanatikaj buboj eĉ improvizis pilkon per ĉifonoj ligitaj per ŝnureto, en la ripoza paŭzo, en la lernejo. Ĉar enveni la lernejon kun ordinara pilko sub la brako estis malpermesite.

La korto de mia hejmo estis la plej bona ludkampo, sufiĉis ĉirkaŭiri la gujavarbon por atingi la kontraŭulan golejon. Krome, la maldensa greso mildigis la suferon de niaj senŝuaj, skrapitaj piedoj. Kaj la ludantoj, preskaŭ ĉiam la samaj, alvokitaj el la najbaraj domoj, estis ĉiuj inter si konataj. La plej talentaj estis lokitaj en kontraŭaj teamoj, por ekvilibrigi la ludon. Neniu restis ekster la partio.

Sed ludi en la domkorto prezentis problemon. De tempo al tempo, je pli impeta piedbato, la pilko misflugis kaj falis en la korton de la najbaro. Ve! Ni neniam havis anstataŭan pilkon, kaj la najbaro estis mishumora ulo. Ni tiam aŭdis sakron el la alia flanko de la muro kaj la pilko revenis senaera, nur post kelkaj tagoj. Ĉiu knabo revenis hejmen elreviĝinta, kaj la fuŝulo, kiu faris la sendirektan piedbaton, fariĝis kulposenta. Por ĉi tiu, restis la puno, ke li devos replenigi la pilkon per aero, per pumpilo por biciklaj pneŭoj. Kaj rekomenciĝis la sovaĝa futbalo.

Ĝi estas demonstra versio de la 125-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Novaj poemoj

de Miguel Fernández



AJ! AJ! AJ! AJ! AJ! AJ!

Milito estas masakro inter homoj, kiuj ne konas unu la alian, profite de homoj, kiuj ja konas unu la alian, sed ne masakras sin reciproke.
Paul Valéry

*For la militon en Ukrainio!
For NATO-n!
For ĉiujn militojn inter popoloj!*

Putin hitleris al Ukrainio.
Por momentoj, la mondo ĉesis spiri kaj nune spiras plu nur grandapene.
Endas uzi armilon ŝargitan per futuro por pafi niajn versojn en ĉi tago.
Angoro, naŭzo, ajoj, morto... hantas.
Ambaŭflanke pereas senkulpuloj nome de damnaj celoj kaj patrujoj.
Kiu nuntempa Eizenŝtejn redonus la tutan animskuan tragedion en ĉi nova Odeso sen Potjomkin?
Ĉi-momente la vera heroeco certe estas rezisti al malamo kaj ne lasi l' esperon alfundiĝi.

**POEZIO, NOME: MUZIKO,
KAJ MUZIKO, NOME: POEZIO**

*Neniam rompu la silenton,
krom por ĝin plibonigi*
Ludwig van Beethoven

Tutmonda sonoro
Kálmán Kalocay

Poemi estas sole muziki per lumvortoj.
Muziki estas sole poemi per lumsonoj.

Jen mi emas poemi: jen ene de mi ŝvebas
birde vortoj provantaj kungrupiĝi
iel sekvante certajn harmoniojn,
internajn kaj eksterajn,
laŭajn al Pitagora muziko de la kosmo,
laŭajn al la muziko de la ĉielaj sferoj.

Mi enmemiĝas
por penetri la celon de la vortoj,
por ebriiĝi de ties proponoj
kaj komenci flugadon
serĉe de l' regno de la nigra feo,
kie regadas l' emocio pura.
Ho, dolĉa ebriiĝo, dolĉa morto!

La interna muziko proponata de l' vortoj
havas la formojn fugo, ario, simfonio,
ĵazaĵ', konĉerto, andaluza kanto....
Ties elan muzikon konsistigas
plej ofte ritmoj dekunusilabaj,
kune kun aleksandraj, sepsilabaj
kaj distie pli kurtaj, ritmorompe.

**Ĝi estas demonstra versio de la 125-paĝa junia *Ondo*. Por legi
la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.
Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:**

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La plej bonaj filmoj de la jaro

de Wolfgang Kirschstein

La disdono de la Oskaraj statuetoj okazis antaŭ kelkaj monatoj. Ĉu vi memoras pri ĝi ion pli ol la fifaman vango-frapon? Ne? Eble pro tio la banala incidento ombris la disdonon de premioj al relative multaj ne tro gravaj filmoj. Tamen ni parolu pri Oskaro, ĉar ankaŭ ĉi-jare la landaj komitatoj sendis po unu filmon por konsidero de la plej bona internacia produktaĵo. Do, jen eble estas oportuna listo de la plej bonaj filmoj de la jaro en la tuta mondo. Mi klopodis spekti laŭeble multajn filmojn de ĉi tiu kategorio, sed kompreneble ne sukcesis spekti ĉion. La internacia distribuo estas ĝangalo kaj – ve! – ankaŭ lingvo foje estas efika bariero. Estus bele, se la distribuantoj de elsendofluoj prenis pli da tiaj filmoj en siaj katalogoj. Tio estus granda paŝo antaŭen por la mondkulturo.



Ili estas ekstere

Ni do ekzameni la mallongan liston – 15 filmoj, kiuj estis elektitaj el ĉiuj prezentoj kaj kvalifikiĝis al nomumiĝo por la plej bona internacia produktaĵo. Frappe por la gusto de la antaŭelektantoj estas, kion ili *ne* konsideris. Tiel la franca *Titane* [Titano] de Julia Ducournau ne sukcesis eniri la liston. Jes, tiu inista horrorfilmo postulas multe de la spektantoj. Probable ne estis nur mi, kiu devis froti siajn okulojn, kiam la ĉefaktorino amoris veturilon (jes, ne mankas prepozicio). Sed la pacienco estas rekompencita en la fino, kiam la filmo spite al sia bruska esprimmaniero ŝanĝiĝas al rakonto pri sopiro al ŝirmo kaj tenero. *Titano* ne estas por la ĝenerala publiko, sed la temo de la konkurso ja estas la plej bona, kaj ne la plej ŝatata filmo de la jaro.

Tio validas ankaŭ por *Memoria* [Memoro] de Apichatpong Weerasethakul. Tiu reĝisoro estas sufiĉe konata nomo en la mondo de artfilmoj. *Memoro* estas lia unua internacia filmo, kaj ĝi estis proponita de Kolombio. Ankaŭ tiu treege malrapida filmo streĉas la paciencon de la spektanto por fine veni al konkludo, kiu ofertas ne nur unu interpreton. Oskaro evidente ŝatas, ke ĉio estu solvita kaj klarigita je la fino, kaj forĵetas filmojn, kiuj estas tro strangaj aŭ intelekte tro postulemaj.

La Akademio ne povis nomumi *Amiran* de Mohamed Diab, ĉar Jordanio retiris ĝin pro politikaj kialoj (alivorte: malamo al Israelo) post vitriolaj enlandaj protestoj.

Diab jam aŭtoris du notendajn filmojn. Estas ĉagrene, ke la scivolema spektanto probable ne havos ŝancon por spekti ĝin mem.

La mondo estas la rikoltejo

Sed nun, ek al la mallonga listo de elekteblaj filmoj. Ĉiam estas interesa, kiam filmo malfermas vidon al malproksima kulturo. Ĉi-jare venis tia filmo el Butano: *Lunana – Jako en la klasoĉambro* de Pawo Choyning Dorji. Tio estas lia debuto kiel reĝisoro. *Lunana* estas interesa pro spirhaltige bela naturo kaj konvinke ĉarma aktorado de infanoj. Temas pri juna instruisto, kiu aspiras internacian karieron kiel kantisto, sed kiu antaŭe devas labori dum unu somero en fora vilaĝo. La ideo: sekvi sonĝojn sen perdi siajn radikojn.



Ankaŭ ĉi-jare ni havas filmon pri abeloj. Pasintjare ni spektis *Miellandon* el Makedonio. La nuna jaro alportis al ni *Zgjoj* [Abelujo] de Blerta Basholi el Kosovo – alia reĝisora debuto. *Abelujo* centras ĉirkaŭ Fahrije, kies edzo ne revenis el la Jugoslavia milito. Kiel ŝi povas daŭrigi la vivon kiel memstara virino en la vilaĝo de vidvinoj? La patriarka socio malhelpas, tamen ŝi sukcesas organizi kooperativon de virinoj kaj finfine eĉ imponas sian tradicieman bopatron. *Abelujo* baziĝas sur vera biografio. (Aliaj rakontoj pri virinoj, kiuj trovas sian propran vojon venis el Kostariko [Clara Sola] kaj Ruslando [Per malpremitaj pugnoj]. Eble *Katedrala Placo* el Panamo havas similan temon, sed mi ne sukcesis vidi ĝin.)



Vivo en aliaj landoj kaj tempoj plue

Mi vivas en Eŭropo. Mi havas ioman scion pri aliaj kontinentoj, sed mi malfacile povas bildigi al mi, ekzemple, la vivon en Afganio dum la unua regno de la talibanoj. *Flugt* [Fuĝi] de la dano Jonas Poher Rasmussen helpas. Amin rakontas la sekreton de sia vivo. La filmo sukcesas rakonti la biografion, kiel unu amiko parolas al alia amiko. La desegnoj mirinde kreas rektan kaj kortuŝan kontakton. *Fuĝi* estis nomumita en tri kategorioj, sed bedaŭrinde gajnis nenion. Bonvolu spekti ĝin, se vi havas la eblon. Mi nepre rekomendas.

Ĝi estas demonstra versio de la 125-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Daniel Stein: Historio pri identeco kaj (mal)kompreno

Ulickaja, Ludmila. *Daniel Stein, interpretanto*: [Romano] / Tradukis el la rusa Tomasz Chmielik. — Lublin: Ars Libri, 2021. — 601 p.

“Donu al mi apogpunkton, kaj mi renversos la mondon”, – diris Arĥimedo. Plejparto de la homoj havas malpli ambiciajn aspirerojn, klopodante almenaŭ resti sur siaj piedoj, kaj tiucele ili serĉas apogon en si mem aŭ en la rondo de similuloj. Ĝuste tion faras la herooj de la romano de Ludmila Ulickaja. Ĉu ili sukcesas?


Baroj lingvaj kaj ne nur

La verko estas granda (576 paĝoj + komentoj) kaj certe ne apartenas al facilaj legaĵoj. La formo mem estas sufiĉe malfacila – temas pri aro de leteroj, noticoj, depeŝoj, gazetaj artikoloj ordigitaj kronologie, sed ne laŭteme.

Ekde unuaj paĝoj leganto plonĝas je tiu labirinto de vivhistorioj, nur paŝon post paŝo malkovrante ligojn inter ili, rekonstruante biografiojn de la herooj kaj iliajn vidpunktojn.

Kompreneble haveblas la centra figuro – Daniel Stein, kies nomo servas kiel la titolo de la verko. Li sufiĉe proksime rilatas al Oswald Rufeisen, reala persono kun kiu Ludmila Ulickaja iam renkontiĝis, kaj kies personeco inspiris ŝin al la verkado. Ne atendu centprocentan koincidon – tio ja estas beletraĵo, do la aŭtorino havas la rajton modifi historian realon kaj ŝi uzas ĝin plene. Tio ne faras la verkon malpli impresa aŭ aŭtenta laŭ sia spirito – ni plu fasciniĝas pri Evangelioj kaj ilia ĉefa persono, kvankam ni scias, ke la tekstoj kreiĝis dum longa pluraŭtora verkado kaj enhavas plurajn aldonaĵojn kaj modifaĵojn.

Kio estis Daniel Stein? Li estis Pollanda judo, kiu dum la Dua Mondmilito servis en Gestapo kiel interpretisto, laŭeble helpante al siaj samgenteroj. Li aranĝis fuĝon de kelkcent judoj el ekstermota geto, tiel savinte ilin kaj preskaŭ pereinte pro tio. Serĉante azilon ie kaj tie, li trovis ĝin ĉe komunumo de karmelanoj kaj post iu tempo petis ke ili baptu lin, ĉar li eksentis sin kristano. Poste li transloĝiĝis al Israelo kaj kreis tie komunumon de judoj-kristanoj, kiun li nomis Eklezio de Jakobo.



Ĝi estas demonstra versio de la 125-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Grupa legado de Dostojevskij

En la jaro 2021, kiam ankoraŭ sufiĉe furiozis la pandemio de la nova kronviruso, grupeto da membroj de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, en Brazilo, decidis komenci kunsidojn de virtuala Legoklubo, kiun ni alnomis omaĝe al la karmemora esperantisto Gilbert Ledon. Ni estas manpleno da legemuloj, kiuj amas literaturon kaj konscias pri la efikeco de legado por kultivado de nia lingvo kaj de niaj pensoj. Ni decidis, ke la grupeto legos ĉiun monaton po du tekstoj por dumkunsidaj komentoj kaj pridiskutoj. Ĉiam po unu en la unua kaj tria ĵaŭdoj, je la 20-a horo (brazila). Malgraŭ la horo, kompreneble alilandaj samideanoj estas bonvenaj, kaj tio efektive ofte okazas, precipe el Koreujo.

Dum la unua ekzistojaro, la klubanoj legis la 25 rakontojn, troveblajn en la konata retejo de Sten Johansson “Originala Literaturo Esperanta”, taksitajn kiel la “plej bonaj originalaj rakontoj en Esperanto”. La afero bone funkciis, kaj ĉiufoje, dum unu horo, ni resumis, notis novlernitajn vortojn, pritraktis lingvajn aspektojn kaj komentis enhavajn aspektojn de la tekstoj. Amuze kaj senpretende. Unu fojon, la konata, eminenta hispana aŭtoro Jorge Camacho konsentis kunsidi kun la legoklubanoj por respondi iliajn demandojn pri lia rakonto trovebla en la listo. Ĝi estis brila vespero!

Nun ni travivas jam nian duan jaron. Kion de nun legi? Post nelonga pripensado, la tuta grupo decidis legi la *Kvin Rakontojn* de Dostojevskij, senpage disponigitajn en la retejo sezonoj.ru. Dankegon al la retejestroj!

La legado kaj komentado de la unua rakonto en la kolekto estis vere entuziasma. *Honesta Ŝtelisto* estas majstroverko! La grupanoj komentis kelkajn apartaĵojn en la teksto:

- kurioze, ke enplektiĝis “rakonto interne de rakonto”, nome unu rolulo rakontas pri alia rolulo — en tre lerta, flua kaj pensinstiga maniero; tion oni nomas “meta-literaturo”;

- unu leganto atentigis pri la simbola signifo de “ŝtelisto”, kaj memorigis pri la krucumo de Kristo, apud kiu troviĝis du reprezentantoj de la Ŝtelista klaso — kaj unu el ili ricevis la ĉielon;


- alia leganto atentigis pri la simpatio, kiun la aŭtoro montras al la malriĉula klaso, en kiu, malgraŭ (aŭ eble pro) longa suferado, aperas pli ofte solidaraj agoj ol en la riĉula klaso; pri tio oni aldonis, ke certe Dostojevskij estas konsiderata kiel “maldekstrulo”, laŭ nuntempaj politikaj (mis)klasifikoj;

- rilate al la bonega traduko oni atentigis pri la akuzativo post “po”, kiu ne ĉiam estas tute klara (Zamenhof jen almetis ĝin, jen ne, kaj almenaŭ por brazilanoj tio ne estas facile komprenebla regulo);

- ankoraŭ rilate al lingvaj detaloj, unu leganto atentigis pri la frazo “Sufiĉas di-

Fjodor Dostojevskij

Kvin rakontoj



Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” bonvenigas humoristojn, karikaturistojn, enigmoverkantojn kaj aliajn “leĝerĝenrajn” aŭtorojn por kunlaboro en nia relanĉita rubriko “Mozaiko”.

Trinku ni po glaso!

Alkoholo ne helpas trovi respondon, sed ĝi helpas forgesi la demandon.

En alkoholvendejo:

- Ĉu vi povus doni al mi botelon da vodko kredite?
- Nu, via vizaĝo montras bonan kreditan historion...

Policano haltigas aŭton:

- Kial vi superis rapidlimon?
- Mi havas estimindan kialon! Necesas veni hejmen pli rapide, ol alkoholo komencos efiki...

Alia policano haltigas alian aŭton:

- Vi aspektas ebria. Ĉu vi pretas trapasi alkoholteston?
- Volonte! Kiun alkoholon ni testu – ĉu vodkon aŭ viskion?

Lekciisto rakontas pri malutilo de alkoholo: “Komplete alkoholo forlasas vian organismon nur post 21 tagoj da nedrinkado!” Malĝoja ĝemo el la halo: “Do, neniam...”

Kial oni ne permesas al la infanoj drinki? Ĉar infanaĝe homoj jam estas sufiĉe feliĉaj.

Neniu amuza historio komenciĝas per vortoj: “Foje mi trinkis kun buboj laktoktelson...”

Trafikŝtopiĝoj en Moskvo iĝis tiom teruraj, ke foje trafikpolicanoj alportas al alkoholaj testejoj tute sobrajn ŝoforojn.

Plukis kaj tradukis **Stanislav Belov**



Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Historia malatento

En pledo de denaska auxstriano, eks-sxtatestro de Kalifornio, [Arnold] Sch[warzenegger] mokas Putin kaj liajn oftajn kriojn “sen-naziigi” Ukrainion, dirante ke Zelenskiyy estas judo kiu perdis diversajn onklojn de Hitlero. (Neil Blonstein, 25 mar 2022, facebook.com/groups/811194062394082/posts/1968962396617237)

Epokoj da persisto kaj insisto

... tion mi jam antaŭ tri jarcentoj postulis. (pluraj listoj, 18 feb 2022, Dietrich Weidmann; trovis Ibrahim Bryzgaloff)

Legu veteranoj

Jen libro konsilinda al iu ajn aĝa leganto... (Elda Doerfler pri la libro Ĉinio, Koreio, Japanio, 14 maj 2022, katalogo.uea.org/index.php?inf=9967; trovis Ionel Onet)

Kaŝa rolo kaserola

episkopo Ivo... direktiĝis en la jaro 1215 al Romo. Li patoprenis tiam en la Laterana Koncilio. (Jacek Bijakowski: *Rakonto pri Sankta Jacinto*, E-Societo Flamo, Toruń, 2020, p. 9; rimarkis Ionel Onet)

Korekte sur la lango

PC – (mallongigo de politically correct, ‘politike gusta’) (*Usona Esperantisto*, nov-dec. 2021, p. 20, elfosis Ionel Onet)

Printempa hurlemo

Ne nepras viziti Nederlandon por ĝui tulipojn kaj aliaj florojn, multe malpli koste vizitis Kriemon aprile, kiel tion faris Paŭlo Moĵajevo, la krimea esperantisto. (facebook.com/groups/494333664936355/posts/494909074878814, 29 mar 2022; trovis Ionel Onet)

Ne atendu ĝis transtombe

... oni havas realisman ŝancon, jam antaŭ la fino de sia vivo povi pli-malpli komplete kompreni esperantajn tekstojn. (Lu Wunsch-Rolshoven: La EU-konferenco apenaŭ rimarkis Esperanton, 21 jun 2022, liberafolio.org/2022/06/21/la-eu-konferenco-apenau-rimarkis-esperanton)

Kampanino, belega kampanino

Esti esperantisto devas signifi samtempe esti interkulturisto. (Novjara saluto por la negregorianoj, EKO-ENHAVO n-ro 3, 8 jan 2022)

Plukis **István Ertl**

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Esperanto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarett 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: oficejo@esperanto.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Pollando: Bjalistoka Esperanto-Societo, Piękna 3, 15-282 Białystok. Rete: kontakt@espero.bialystok.pl

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 125-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>